

Amuza lernado

①

Per kiuj literoj necesas anstataŭigi la demandsignojn?


S M V ? M J S U N

V P O A F M ? M K M P J V

C D E F ? A H C

②

Lernu la proverbojn **pri arbo** el la proverbaro de L. L. Zamenhof!



En arbaro sidas kaj arbojn ne vidas.
Kiu timas bestaron, ne iru arbaron.
Laŭ la frukto oni arbon ekkonas.
Lupo sopiras, al arbaro sin tiras.
Ne elvoku lupon el la arbaro.
Ne falas frukto malproksime de arbo.
Se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas.
Sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj.
Pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro.

Juna Amiko - decembro 2012/31↑ 2012/32↓


③

K V I Z O - L U D O

1. Daŭrigu la frazojn per almenaŭ kvin vortoj: a) En arbaro vivas b) La amiko donacis c) Tri knabinoj iris
2. Skribu tri frazojn, en kiuj vi uzas nek - nek.
3. Aldonu finaĵon -n kie ĝi necesas. - Mi konas li kaj li konas mi. Li kaj ŝi vizitis mi. Mi vidis li kun ŝi. La instruisto vokis vi kaj ili. Ni li ne vokis.
4. Klarigu diferencon inter - arbfolio kaj foliarbo; - florgardeno kaj ĝardenfloro.
5. Skribu per vortoj la jenajn horloĝindikojn. – 10:30 – 6:15 – 8:20 – 12:37.
6. La mankantaj vortoj diferenciĝas nur laŭ la komenca litero. Inter montoj estas... Por spici supon taŭgas Danci oni povas dum
7. En ĉiu vort-vico estas unu vorto, kiu diferenciĝas de la aliaj. a) hundo, kapro, karmo, lafo. b) Parizo, Sofio, Vieno, Zuriko. c) kapo, kolo, koro, kruro.
8. Ŝerca demando. Kiu povas respondi en ĉiuj lingvoj?
9. Kiel vi festas la alvenon de printempo? Skribu almenaŭ tri frazojn.
10. Skribu la nomojn de konataj Esperanto-verkistoj kies antaŭnomoj estas: Antoni - Julio - Raymond - Hilda - William.

④

S o l v u l a k r u c e n i g m o n !



VERTIKALE

1. Oranĝkolora legomo.
2. Belsona, kiel sono, kiu venas de preĝeja turo.
3. La malo de en.
4. Periodo en kiu la luno rondiras la teron..
5. Periodo en kiu la tero rondiras la sunon.
6. Valora metalo.
7. Registron de tempo-punkto: 'Notu tiun ___ en viaj tag-libroj.'
11. Centro (R)

HORIZONTALALE

2. Periodo de sep tagoj.
7. Malplezuriga.
8. Membro (R)
9. Direkto mala al sudo.
10. Bongusta suko-plena ruĝa frukto, kiun oni kutime opinias legomo.
12. Kares-nomo por periodo de sesdek minutoj.
13. Elstara parto de vizaĝo, per kiu oni sentas aromojn.

(R) = uzu nur la radikon, sen la finaĵo

Juna Amiko - aprilo 2013/29

⑤

I o m d a m a t e m a t i k o

La unua tasko

En iu korto estas kelkaj leporoj kaj kelkaj fazanoj, entute 35, havantaj kune 94 piedojn. Kiom da leporoj estas? Kiom da fazanoj estas?

La dua tasko

Se mi dividas duonon de la cento per duono, kio rezultiĝos?

La tria tasko

Du turistoj eksidis ĉirkaŭ manĝotablo. La unua kunportis du frititajn fiŝojn, dum fiŝon. Tiumomente aliĝis al ili tria turisto, kunportanta neniun fiŝon. Sed la triopo kondiĉe ke la tria turisto pagus al la ceteruloj 5 eurojn rekompence. Kiamaniere l devas dividi la monon?



Juna Amiko – majo 2014/10

⑥ Serĉu 12 landojn, kiuj kaŝas sin en la kradaro!

O	D	N	A	L	S	I	V	S
J	A	P	A	N	I	O	T	B
H	U	N	G	A	R	I	O	O
R	S	O	T	L	E	C	D	A
B	T	J	S	I	L	I	N	N
B	R	A	Z	I	L	O	A	O
D	A	V	O	C	E	I	L	I
R	L	G	H	I	C	C	L	N
M	I	U	D	X	L	N	O	A
O	O	R	V	A	N	A	P	P
E	S	U	I	E	G	R	T	S
O	N	I	N	E	B	F	R	I
O	I	N	A	M	R	E	G	H

Instrukcioj: ĉiuj direktoj validas! Bonan lando-serĉadon al ĉiuj!

Juna Amiko – aprilo 2013/15

⑦ Saluton el la malproksima nordo!


Mi ricevis proponon eklabori en *Yellowknife*, la ĉefurbo de la kanada **Nord-Okcidenta Teritorio**. Ĝi estas lokita tre malproksime de la dense loĝataj urboj kaj pro la severa klimato, nur malmultaj homoj vivas ĉi tie. Oni bezonus tri tagojn por senpaŭze veturi ĉi tien per aŭtomobilo. En la teritorio estas du ĉefaj lagoj: Granda Sklava Lago kaj Granda Ursa Lago, kun la **Arkta Cirklo**. Tuj post alveno, mi rimarkis ĉie multajn rokojn kaj neniu grundon taŭga por agrikulturo aŭ ĝardenoj.

Komence de somero la suno brilas preskaŭ la tutan nokton, kun tre mallonga paŭzo post noktomezo. Oni vidas ke krepusko daŭras entute ne pli ol kvarono de la nokto: kelkajn horojn antaŭ noktomezo kaj tuj antaŭ sunleviĝo. Tiam la ĉielo estas trankvila en koloroj de hela bluo kaj indigo. Tial al novaj vizitantoj la urbeto ŝajnas esti iom magia.

Kvankan la plej granda sur la tre vasta lando, nia urbeto havas nur ĉ. 19 mil da loĝantoj. Krom la vivantaj delonge **indianoj de la norda Dene-tribo**, venis ĉi tien homoj de diversaj profesioj kiel ekz. kuracistoj aŭ laborantoj en poŝto, lernejoj kaj polico. Homoj estas ĉi tie

afablaj, kun rideto kaj — kiel oni diris al mi — ĉiu konas ĉiun. La domoj estas aliaj ol tiuj en aliaj partoj de la lando. Ili estas malgrandaj, unu-etaĝaj kaj ŝajnas kreski rekte el la rokoj. Iutage mi uzis la okazon bicikli en kaj ĉirkaŭ la urbeto: de la centro ĝis la indiana rezervejo kaj al orienta duoninsulo en Granda Sklava Lago (la plej profunda en Nordameriko — 614 metrojn) kaj poste al **eksa orminejo**, sude de *Yellowknife*. En la pasinta jarcento venadis ĉi tien homoj por trovi trezorojn kaj travivi la „vere nordan“ sperton.

En septembro mi vidis ĉasistojn prepari viandaĵon de granda alko. Aŭtuno estas mallonga, ĉar frue venas frosto kaj neĝado. Vintro estas malluma kaj malvarmega: la temperaturo atingas minus 50 gradojn celsiusajn. Vojoj kovritaj per neĝo fariĝas malsekuraj por aŭtomobiloj. Tiam oni ofte veturas per hunde tirataj sledoj kaj provas fiŝkapti sur laga glacio. Sed oni povas ekvidi mirigan fenomenon sur la ĉielo: nordan brilon, nomatan ankaŭ polusa lumo – latine kaj angle: *aurora borealis* kaj pole: *zorza polarna*.



Kun plej bonaj bondeziroj! – Paul Sulżycki

Juna Amiko – decembro 2012/25

⑧

R I D U !

HUMURO de Dieter BERNDT

„Hodiaŭ mi vidis vian avon. Diru al mi: Kiom-aĝa li jam estas?“ „En tiu ĉi jaro li fanĝos 100-jara.“ „Ĉu vere? Kaj kia-maniere li atingis tiun altan aĝon?“ „Tute simple. Li naskiĝis en la jaro 1905.“

La instruisto diras: „Estas devo de ĉiu el vi, almenaŭ unu-foje en semajno fari ion, ke iu alia estu feliĉa. Franĵo, ĉu vi faris tion?“ „Jes, sinjoro instruisto.“ „Bone, tio plaĉas al mi. Kaj kion vi faris?“ „Mi estis ĉe mia avino kaj ŝi estis tre feliĉa, kiam mi foriris.“

„Sinjoro instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, kion li ne faris?“ „Certe ne.“ „Tio estas bona. Mi ne faris la hejman taskon.“

Juna Amiko – decembro 2005/42


Gepatroj en kamparo havis filon, kiu ne ekparolis antaŭ la aĝo de naŭ jaroj. Tiam li estis staranta de la kampo-rando kaj rigardis sian patron, kiu laboris. Subite la filo rimarkis virbovon minace ekkuri al la patro.

- Ho, paĉjo, atentu! Virbovo!

Tio savis la patron, kiu poste demandis:

- Pro kio vi nur ĵus ekparolis la unuan fojon en via vivo?

- Antaŭe mi havis nenion por diri.



Juna Amiko – decembro 2006/36